# *La kubaj deputitoj kontrolas la plenumon de la decidoj parlamentaj.*



Havano, 27 feb (RHK) Kiel parto de sia laboro, 325 deputitoj de la tuta lando, helpate de provincaj delegitoj kaj reprezentantoj de la nacia asocio de ekonomistoj kaj librotenistoj de Kubo (ANEC) efektivigos kontrolon la 25-an de marto.

La kontrollaboro efektivi?os por revui la plenumon de la interkonsentoj adoptitaj dum la oka periodo de sesioj de la parlamento, kaj aparte pri la rekmendoj faritaj de la komisiono pri ekonomiaj aferoj, tiel klarigis Armando Utrera, vicprezidanto de la komisiono.

La celo estas konfirmi kio okazis dum la lastaj du monatoj rilate la agadplanojn kaj decidojn adoptitajn por da?re kontroli la laboron, kiel petis la prezidento Raúl Castro dum la ferma parolado anta? la parlamento; samkiel pri la raportoj prezentitaj de la ministro pri financoj kaj prezoj, Lina Pedraza kaj la ministro de ekonomio kaj planado, Ricardo Cabrisas.

La rezulto de tiu ?i kontrolo estos prezentita la venontan aprilon al la prezidanto de la kuba parlamento.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/122759-la-kubaj-deputitoj-kontrolas-la-plenumon-de-la-decidoj-parlamentaj

**Radio Habana Cuba**